Ek al!
Freŝa vento en Aŭstrio

Salutvortoj
de la nova prezidanto
de Aŭstria Esperanto-Federacio,
Univ-prof. d-ro
Hans Michael Maitzen

Je la 8a de aprilo mi estis elektita nova prezidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio (AEF), transprenante la taskon de Herbert Mayer, kiu dum 3 jaroj estris tiun asocion en grava transira fazo, unue pro la fakto, ke la skismo en la aŭstra esperantistaro, reganta dum 40 jaroj unue inklinis kaj poste fakte venis al malapero, kaj due, ke la ĉefa kolono de la Esperanto-videbleco en Aŭstrio, la Internacia Esperanto-Muzeo Vieno, atingis per li, sia estro, multe pli reprezentivan kadron en la nova ejo, Palaco Mollard. Pro tio mi esprimas al li en la nomo de nia asocio AEF la plej altan respekton kaj same amikan dankon.
Nia asocio devis verki kaj akiri novan statuton, koresponde al renovigo de la leĝo. Kvankam la mallongigo, jam pro tradiciaj kaj praktikaj kaŭzoj, restis sen ŝanĝo, do AEF, eta, sed laŭ mi signifa modifo enkondukiĝis: la vorto Esperanto nun plene aperas en ĝi, kaj ne estas vualita per la vorto "Esperantista". Estas per tio signita la komenco de nova epoko de la Esperanto-movado en Aŭstrio, kiu neforgesante la gravajn atingojn historiajn tamen adiaŭis sin de malaktualaj konceptoj.
Ni do liberigite povas dediĉi nin ne plu al energirabaj internaj diskutoj, sed al videbla kaj aŭdebla partopreno en la publika diskuto pri la internacia lingva solvo kune kun pli intensa flegado de nia kultura kaj lingva bazo Esperanto kaj ties disvastigo.
Ek al!

H.M.Maitzen, prezidanto
de Aŭstria Esperanto-Federacio
2006 06 08

Nova Esperanto-vivo
en Aŭstrio

En la lastaj du jaroj Esperanto revivigis en Aŭstrio: Fakte dum kvin jardekoj la membraro de Aŭstria Esperanto-Federacio (AEF) malkreskis. Sed tio ŝanĝiĝis, en la lastaj tri jaroj multaj novuloj aliĝis, tiel ke la membraro duobliĝis kaj atingis la nombron cent. Tio ne estas giganta kvanto, tamen kuraĝiga signo, ja estas tute verŝajne, ke tiu pozitiva tendenco ne haltos en la futuro.

Univ-prof. d-ro Hans Michael Maitzen,
prezidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio

La kialoj de tiu pozitiva evoluo estas pluraj: Ne plu estas skismo inter la aŭstraj esperantistoj – ĉiuj kunlaboras. La nova hejmpaĝo, kiu nin prezentas kaj kiun ni ankoraŭ plibonigos kaj plibeligos, alportas al ni daŭre aliĝojn. La nove aranĝita Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko informas multajn interesitojn. Kaj fine nia asocio havas novan strukturon, en kies kadro nia laboro por Esperanto estas pli efektiva.
La 8an de aprilo de tiu ĉi jaro, la fervore aktiva Linza grupo perfekte gastigis la ĝeneralkunvenon de Aŭstria Esperanto-Federacio, pro kio ni ĉiuj kore dankas al ili. Ŝajnas, ke tiu kunveno enkondukos novan periodon: La lastaj tri jaroj estis kvazaŭ la fazo de regeneriĝo de la Esperantovivo en Aŭstrio. Multe restas farenda ankoraŭ, sed la bazo estas metita. La kvazaŭ provizora prezidanto, Herbert Mayer, transdonis la gvidadon al Prof. Hans Michael Maitzen, kaj elektiĝis parte nova estraro. Jen la funkcioj: prezidanto: Prof. H.-M. Maitzen, vicprezidanto: Otmar Liebhart, kasisto: Christian Eppler, vickasisto: Herbert Mayer, estraranoj kun specialaj taskoj: Gregor Hinker (junularo), Katinjo Fetes-Tosegi (Eŭropo), Yas Kawamura (instruado), Heinz-Paul Kovacics (gazetaro), Leopold Patek (UEA).
Jen ankoraŭ gravaj decidoj, kiujn ni faris dum la kuveno: La kunlaboro kun niaj germanaj amikoj pri la revuo *Esperanto aktuell* daŭru. Fondiĝu grupo, kiu repondecas pri la aktualigo kaj la nova aranĝo de la hejmpaĝo. Ellaboriĝu kontrakto inter la junularo kaj AEF, kiu permesu, ke la junuloj fariĝu membroj ĉe AEF. Speciale la realigo de la lasta punkto alproksimigos AEF kaj la junularon, tiel ke fakte ĉiuj fortoj en Aŭstrio post kvin jardekoj ree kunagos en harmonio.

H. Mayer, Vieno

Esperantoprojekt
in der Klasse 7b

Am 2. Juni 2006 wurde am Bundesgymnasium Wien 15, Diefenbachgasse 19, ein Sprachprojekt veranstaltet, in welches auch ein Besuch des Esperanto- und Globenmuseums integriert wurde.
Von 9 bis 11 Uhr referierten die Schüler der 7b-Klasse über diese Themen:
- Offizielle und nicht-offizielle Sprachen in der EU
- Sprachen und Sprachfamilien
- Dialekte, Hochsprachen, Plansprachen
- Flektierende (z. B. Deutsch, Litauisch) und agglutinierende Sprachen (z. B. Türkisch, Chinesisch)
- Die Plansprache Volapük
- Die Plansprache Esperanto
- Die Plansprache Ido
- Die Plansprachen Interlingua und Interlingue

Es folgte eine kurze Einführung in das Esperanto. Schließlich wurden das Esperanto- und Globenmuseum im Palais Mollard in Wien 1, Herrengasse 9 besucht. In beiden Museen gab es Führungen durch Mitarbeiterinnen der Österreichischen Nationalbibliothek.
Fotos zum Projekt und Texte zum Thema können bei esperanto@chello.at angefordert werden.

Prof. Mag. Walter Klag, Wien

Ni gratulas al niaj amikoj pro la reviviĝo de Esperanto en Aŭstrio kaj esperas ke venos multaj informoj pri la aktivecoj, kiuj plenigos la estontajn aŭstriajn paĝojn de *Esperanto aktuell*.

red.